

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Aŭstralazia Esperanto-Aŭsocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 75 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 septembro 1926

2FC WILL BROADCAST ESPERANTO LESSONS.

Following on the success attending 2KY's Esperanto wireless lessons, one of the largest radio stations in Australia, 2FC, Sydney (popularly known as "Farmer's") have decided to broadcast a short course in the language.

Commencing on Wednesday, September 15th at 7.40 p.m., Mr. J. N. Edmonds headmaster of Campsie Public School, will conduct six weekly lessons in Esperanto, and, if these meet with sufficient public approval, it is more than probable that a further series will be arranged.

Mr. Edmonds, who was nominated by the Sydney Esperanto Society, needs no introduction to Australian Esperantists, as his efforts are well remembered in furthering the interests of Esperanto in educational circles, and, more particularly, amongst the N.S.W. Teachers' Federation. In his capacity as Japanese instructor at North Sydney Boys' High School a few years ago, most noteworthy success was achieved and he was subsequently appointed headmaster of the school he now holds. During his spare time at the High School a voluntary Esperanto class was conducted, also with gratifying results. In Sydney University, Mr. Edmonds was instrumental in obtaining the Board's consent to teach Esperanto to students evincing a desire to learn it, and a class was thereupon formed.

It is reported that one of the pupils at North Sydney Boys' High School, shortly after Mr. Edmonds' instruction, passed an exceedingly difficult examination and became Australia's youngest amateur wireless transmitter using the international language in communicating with foreign countries.

As 2FC can be heard all over Australia, in New Zealand, Fiji and New Guinea, and frequently in Hawaii and the United States (their power being 5000 watts on a wavelength of 1100 metres) Esperantists and their friends are advised to be on the alert for these transmissions and report successful reception to the broadcasting station direct. Only by so doing can the use of Esperanto be encouraged.

HINTS TO STUDENTS.

There is no "open sesame" to Esperanto. To attain the ability to speak, read and write, one must study and work continuously. Read aloud for 15 minutes daily. Write letters to students in other countries. Learn the grammar, correlatives, prefixes and suffixes by heart. It is only wasting time to look at your text book once a week. Every day a little study and a lot of concentration and after a while you will waken to the fact that Esperanto is a most fascinating worth while study, and one which sharpens your wits and develops your brain power. It is to the brain what physical culture is to the body.

LA SEP MALLABOURULOJ

(Daŭriĝo.)

Tiamaniere tago post tago preterpasis, plenlumo sekvis plenlumon, kaj fine la gepatroj tute malesperis revidi iam la filojn. Ili plendis pro tio, ke kredeble ili devos pasigi solece siajn lastajn tagojn.

Jaro post jaro preteriris, kaj oni preskaŭ forgesis la formigrintojn. Sed unu tagon, kontraŭatende oni aŭdis krion "Jen alvenas la sep mallaboruloj." Ĉiuj alrapidis al pordo, penante plenvidi la revenantajn migrintojn. Tiuj ĉi lastaj portis fosilojn kaj ĉiusecajn ilojn, kaj rigardante nek dekstren nek maldekstren, marŝis ofendete laŭstrate, salutante nenion. Oni ne povas skribi pri la ĝojo de la gepatroj pro la reveno de la filoj. Ili estis vojaĝintaj alilande kaj tie sciigis ke ne estas necese iri tra la mondo, se oni deziras labori . . . jen ilia diro tiun vesperon al la gepatroj, kaj kiajn planojn ili antaŭmetis proponi al la nekredema patro, neniu el la sciavidaĵaj najbaroj informigis. Neniu kuraĝis eniri en la domon, kaj neniu el la sepo sin montris ekster pordo.

Morgaŭmatene oni vidis mirindan spektaklon. La sepo mallaborema iris kun fosiloj kaj ŝoveliloj al herbejo de la patro kaj tie faris longan fosaĵon, per kiu ili intencis konduki akvon for de la marĉo al la Weser. La fosaĵo post mallonga tempo bone senakvigis la pestejon, kaj post tio, la laborantoj konstruis laŭ la bordo de la rivero altan digon inter sablomontetoj, kiuj formis la limojn de la patra bieno. Tio, ili pensis, ŝirmos la kampojn kontraŭ estontaj superakvaĵoj. Antaŭe la najbaroj kredis, ke la sepo vere plibonigas, kaj ke ili fariĝas la plej laboremaj homoj en la mondo, ĉar de frua matena ĝis vespero, oni povis ilin vidi starantaj en la fosaĵo, kaj de kokokrio ĝis malluma nokto ili alportis teron al la digo. Sed kiam la sekigita kaj ŝlimsterkita kampo en somero produktis belegan herbon kaj bongustan trifolion, tiel dikan kaj altan, kiel oni neniam antaŭe vidis en la tuta ĉirkaŭaĵo, kaj kiam oni vidis la fratojn eliri por falĉi la rikolton kaj senĝene enporti la riĉan benon en novan fojnejon, kiun ili jam konstruis, . . . tiam iom vidiĝis la friponeco kaj ruzeco de la sep revenintoj. "La kompatinda patro," diris la najbaroj, "estas laborema homo, kiu neniam ĝenis sin pro tiaaĵoj dum sia tuta vivo. Paŝis kontente en la akvon ĝisgenue, kaj rikoltis neplendeme ia

herbon, se io ja kreskis sufiĉe por tio. La filoj jam faris la aferon pli senĝena por si mem, ili ne volas laboradi."

Venis aŭtuno, kaj la sep mallaboruloj alportis ŝtonojn kaj konstruis grandan domon apud la loĝejo de la patro. Tiel rapide la konstruo prosperis, ke oni preskaŭ povus kredi, ke la domo elkreskas el grundo, kaj iu novulo kredus, ke la fratoj estas la plej laboremaj en la mondo, ĉar ili estis tiele okupataj pretigantaj morteron, alportantaj lignon kaj surmetantaj ŝtonon sur ŝtonon. Sed kiu konis la fratojn, tiu sciis, kion ilia diligenteo signifis. Ankaŭ oni baldaŭ aŭdis, ke la plej maljuna jam elektis edzinigonton, kaj kiam, ĉe fino de la aŭtuno, li enkondukis ŝin en la novan domon kiel edzinon, la najbaroj diris pri tio: "Tial homoj estas tro komfortaj je si. Ili timas, ke la patra domo estos tro malgranda kaj ili estas tro mallaboremaj akomodigi kaj kontentigi kun malmulto. Kiam printempo alvenis, la sepo kulturis la kampojn, kaj ĉar ili havis multan libertempon ĝis la rikolto, ili konstruis kvin domojn laŭlinie kun la patra domo. Ĉiu koloriĝis pli parade ol la aliaj kaj ili brilis per ĉiuj nuancoj de la ĉielarko. La najbaroj tuj konjektis tion kio estos okazinta, kaj kiam post la fojna rikolto la kvin ceteraj fratoj kun granda ĝojo kaj muziko solenigis sian edzigon, kaj ĉiu kun sia juna edzino ekposedis unu el la novaj domoj, la piaj najbaroj multe ĉagreniĝis, ĉar ili mem loĝis kun siaj boĝefiloj sub unu tegmento ĉiutimeme kaj kontente. La plej juna filo restis ĉe la patra domo, ĉar la plej maljuna ja cedis al li sian rajton, kaj por edziĝo li estis ankoraŭ tro juna.

Jen staris la sep domoj laŭlinie kun mezuritaj interspacoj, ĉirkaŭate per fruktuoj kaj legomĝardenoj malantaŭe kaj flanke. Tiujn ĝardenojn ili ĉirkaŭis per dikaj dornaj kreskabariĵoj por forteni intrudemajn bestojn, ĉar ili ne sufiĉe amis laboron por forpeli dum malvarmaj noktoj leporojn al siaj brasikoj. Ili plivolis dormi. Post tio ĉiu konstruis ĉeval kaj bovinejojn kaj grenejojn kontraŭ sia domo. Pro tio, ili havis plenecon da nutraĵo por la bovinoj, kaj ilia brutaro mirige multegiĝis. Tiamaniere fariĝis longa kaj larĝa strato, kiun ili plantis per tilioj ĉe ambaŭ flankoj, kaj laŭlonge de la mezo ili metis belan ŝtonan pavimon. Se iu preteriranta novulo demandus la nomon de la bela strato

kaj kiuj tie loĝas, la najbaroj povus nur diri, se ili volus diri la veron, "La loĝantoj estas la sep mallaboruloj, kiuj plantis tiujn ombroplenajn arbojn pro tio, ke ili estas tro mallaboremaj foriri al la Oslebshaüser Arbaro por spiri la freŝan abaran aeon, kiel ĉiuj loĝantoj faris depost antaŭmemora tempo. Ankaŭ ili estas tro mallaboremaj purigi la piedvestojn, kiuj fariĝas malpuraj kaŭze de pluvo kaj kotaj vojoj, plivole ili konstruis multekostan pavimon, kiun ili konservas puran kaj netan eĉ dum la plej malbona vetero, anstataŭ paŝi sur kota vojo laŭ malnova kutimo, ĉar ili evitas ĉiun zorgon, virinecigante pro nenecesa laboro."

Fine venis la tempo, kiam la plej juna frato edziĝis. Goje la gepatroj ekziĝis de l' mastraĵo, kaj la edziĝa soleno festiĝis per granda beleco.

La fratoj vivis en harmonio multajn jarojn. Estis rimarkinde ke iliaj havaĵoj pligrandiĝis tagon post tago, kvankam ili ne estis tiel okupataj kiel la najbaroj. Ili ne eniris en la Oslebshaüser Arbaron; ili ne sidis nokte en la mezo de brasikoj por forpeli leporojn, sed, se estis okazo per kiu ili povus fortigi sian mallaborecon, ili sklavlaboradis nokte-tage per ĉiuj siaj fortoj.

Samkaŭze, ili komencis dum la maljuneco fosi kaj elkavigi meze de la strato, tiel ke la najbaroj sciavide rigardetis super la barilojn kaj cerbumis multe pri la nova malsaĝaĵo. Post relonge aperis bela puto kaj la enigmo solviĝis. Tio estis la lasta ruzaĵo, sed pri tio la sepo ne povis kaŝi la ennaskan emon al mallaboreco.

La gepatroj de la sep mallaboruloj kuŝas jam multajn jarojn en tombo, sed el la najbaroj vivis ankoraŭ multaj, kiuj konis la honestan patron. Kiom da milfojoj dum sia vivo li alportis de la Weser sitelon da akvo. Sed la gefiloj kaj bogefiloj estis tro fieraj kaj mallaboremaj alporti akvon de rivero. Por tio fosis la puton, ilia lasta trompago.

Sed, se oni demandas nuntempe pri la strato, kie loĝis la sep temporabistoj lasu lin aliri al la Strato de l' Mallaboruloj, en la nuntempa urbo Bremen. La belaj tilioj plejparte n-alaperis. La puto ankoraŭ ekzistas, tamen ofte replibonigate, en la mezo de la strato. El la Germana lingvo.

KRONIKO.

MELBURN. V. — Unu dimanĉon dum la pasinta monato, kelkaj anoj el la Melburna Esperanta Societo, faris tre bonan ekskurson al Burwood kaj Wattle Parko, kie la fresa aero kaj beletaj ĉirkaŭaĵoj tre plaĉis al ĉiuj.

Tre interesan paroladon "Vizito al Parizo" de s-ro. Scurrie, estis bone akceptata de la anoj. — Traduka nokto, kiu estis aranĝita, estis granda sukceso, kaj ĉiu partoprenis tutkore, kiel ankaŭ pri la Senpreparaj Paroladoj, kiuj donis grandan okazon al ĉiu ekzerci sin en la parolado.

La monata debato, "Ĉu la bona kuiristo aŭ la eminenta ŝtatisto estas la pli bona amiko al homaro?" — temo iom ŝerca iom grava, elvokis diversajn opiniojn kaj fine rezultis en venko por la "Kuiristo."

Entusiasma anino aranĝis la stariĝon de nova Esperanta grupo ĉe Elwood. La kunvenoj komenciĝos tre baldaŭ, kaj ĉiuj volas al la grupo grandan sukceson.

SYDNEY. — Tre kuraĝiga signo akompanas la dissendadon de la esperanto kurso ĉe 2KY (Trades Hall Broadcasting Station, Sydney). Ĉiusemajne la administracio ricevas leterojn de aŭdantoj partoprenante aŭ aprobante la kurson kaj lernolibroj estas grandnombre vendataj. Oni ankaŭ laŭdas la kursgvidanton pri siaj interesaj antaŭparoladoj kaj klara elparolado angle kaj esperante.

Nova grupeto kunvenas ĉiujauĉe en "Adyar Hall," Castlereagh Street, (teozofista klubejo). Instruantino estas f-ino Heleno Anderson.

S-ro L. E. Pfahl denove parolis perradie pri Esperanto ĉe 2FC. la 16an. kaj 30an. aŭgusto kaj ree parolos la 13an kaj 20 an. septembro.

De kiam ni laste raportis, gazetartikoloj aperis en "Sydney Mail," "Labour Daily," "Radio" kaj "The Australian Highway." Rimarkinde, kaj samtempe bedaŭrinde, estas la tuta foresto de ia kable telegrafita novaĵo pri la Edinburgha Mondkongreso en Aŭstralia ĵurnalaro. La loka Esperanto-Societo intencas sendi raportojn al ĉiuj tagĵurnaloj kiam oficialaj priskriboj alvenas.

AUCKLAND, NOV-ZELANDO. — Pro akcepto de ofico ĉe la loka radiostacio, la sekretario de la Auckland

Esperanta Asocio estis devigita rezigni sian oficon en la Asocio. Ĉiu multe bedaŭras tion, ĉar s-ro Crago estas energia laboranto. Li tamen laboros por Esperanto, ĉe la Radiejo, ĉar li jam ricevis permison brodkasti en la intereso de Esperanto.

WELLINGTON, NOV-ZELANDO.

—Ĝis skribdato, kvar brodkastoj estis dissendigitaj en 2YK (la loka stacio) Lastfoje, la 19 aŭgusto, s-ro W. H. King mallonge klarigis, kial Esperanto estas simpla kaj facile lernebla; kaj por fortigi la paroladon li komparis Esperanto kun la Angla, konkludante kun deklamo de unu el la poemoj de Longfellow "Excelsior." Nuntempe oni faras aranĝojn por enkonduko de Esperanta Kurso per radio.

Por pruvi ke Esperanto estas simpla lingvo, s-ro King dum duhora leciono, instruis la Esperantan Gramatikon al universitatano kiu dubis pri la simpleco de la lingvo. Post la leciono, la agrable surprizita instruisto sidigis kaj skribis en Esperanto korektan leteron de ok linioj.

ESPERANTO IN THE TELEGRAPHIC SERVICE.

According to a communication of 8th April, the Minister of Posts, Telegraphs and Telephones of Czechoslovakia has ordered that telegrams in Esperanto shall be considered as in a clear language in the internal service as from 15th April. The same rule will apply in Germany from 1st November, 1926, according to information from the Ministry of Posts of the German Republic. In Rumania, Esperanto has been considered as a clear language since 1909.

From 1st November 1926 Esperanto will be treated as a clear language in international communications in accordance with the decision of the last international conference of the Universal Telegraphique Union in 1925.

—I.E.S.

ESPERANTO IN EDUCATION.

The French Chamber of Commerce in London, after hearing an address on Esperanto by Mr. Le Brun, Director of the Compagnie Generale Transatlantique, unanimously adopted a resolution proposed by M. Boucher, recommending the teaching of Esperanto in the French licees in London.

—I.E.S.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata amiko,

La dromajo estas senflugpova birdo, kiu ofte kreskas ĝis pli ol ses futoj alta, kaj apartenas al la kasuaro-specaro, kaj troviĝas nur en Aŭstralio.

Kvankam la dromajo jam estas ekstermita en multaj lokoj, kie antaŭe centoj el ili libere vagadis, ili ankoraŭ troviĝas en multaj partoj de Aŭstralio. Al la birdamanto estas granda plezuro trovi neston de dromajo kun la grandaj malhelverdaj ovoĵoj, kiuj ordinare estas dudekoble pli grandaj ol la ovo de la kokino. Multe da ovoĵoj estas kolektitaj ĉiujare ĉe la enlandaj bienegoj, kaj kiam ili estas gravuritaj la tre blanka malsupra tavolo de la ovŝelo bele kontrastas kun la malhelverda eksteraĵo, kaj muntite per arĝento ili fariĝas belaj ornamaĵoj, multŝatataj de vizitantoj al Aŭstralio.

La junaj dromajoj estas striitaj palbrune kaj grize, sed ili baldaŭ perdus la belajn striojn. En la plej malfruktodona parto de Viktorio, kie ne estas eble trovi akvon, en la senvoja dezerto de arbetaro kaj sablo, la dromajo estas hejme, sed ofte en la senpluva periodoj multaj el ili mortas pro manko de akvo. Post tagoj de soifo la dromajoj, kvankam nature timemaj, ofte venas proksime al la domoj ĉe la bienegoj, kaj eĉ eniras vilaĝojn serĉante akvon.

La dromajo estas plibela birdo ol la struto kaj ankaŭ pli inteligenta. Ĝi novas tre forte piedbati, kaj ĉe la Melburna Zoologia Ĝardeno, kiam ili malpacas inter si, ili kelkfoje rompis la ferbarilon per piedbato, kvankam la ferstangoj havas dikecon de duona colo.

Ili ankaŭ povas tre rapide kuri. Antaŭ ne longe oni pruvis la rapidecon per aŭtomobilo; la aŭtomobilo atingis rapidecon de 31 mejloj en horo, dum la birdo ankoraŭ kuris antaŭ ĝi.

Dum mia vojaĝo tra Afriko, kie oni edukas strutojn multnombre, mi faris ekskurson per aŭtomobilo sur vojo ĉe kies unu flanko troviĝas ferbarilon, kaj digo ĉe la alia. Ni veturis po 20 mejloj en horo, kiam struto aperis sur la vojo antaŭ ni. La veturigisto penis per krioj forpeli la birdon, sed vane: tiam li plirapidigis la aŭtomobilon ĝis ni veturis 25 mejlojn en horo, sed la struto ankoraŭ kuris antaŭ ni, uzante la mallongajn

flugilojn de tempo al tempo por pli-rapidigi la kuradon, kiam la aŭtomobilo troproksimiĝis al ĝi. La struto jam kuris pli ol unu mejlon antaŭ ol oportuna loko ebligis ĝin lasi la vojon. Ŝajne la rapida kurado ne laciĝis la struton, ĉar kelke da minutoj poste ni povis vidi ĝin ankoraŭ kuranta.

Alia interesa besto kiu troviĝas en Aŭstralio, estas la manato, ofte loka romata marbovino, kaj pleje trovata ĉe la kotaj marbordaj de Kvinslando, kie abunde kreskas la manata herbo, per kiu la besto sin nutras. Ordinare la manato troviĝas en aroj el 12 aŭ pli multaj. Plenkreska besto atingas longon de naŭ futoj, kaj largon de tri futoj trans la plejgranda parto de la dorso, kaj pezas preskaŭ duonon da tuno. La kapo havas kuriozan formon, kaj iom similas kaj al fiŝo kaj al porko. Ĝi estas varmsanga besto. Ĝia haŭto estas treege dika kaj fortika, kaj havas dikecon de unu ĝis unu kaj duono coloj je la dorso, kaj estas ardezkolora, parte kovrita de mallongaj blankaj haregoj, kaj ofte parte kovrita de marparazitaj.

La nazo estas kovrita de dikaj brosimilaj haregoj per kiuj la besto (ĉiu aŭtoritatulo konsentas ke ĝi estas besto) eltiris la marherbon, enlekante tiun ĉi nutraĵon per lango, kiu ankaŭ similas broson en la buŝon al la mueldentoj.

La indiĝenoj ĉasas la manaton per kanotoj, lerte ĵetante harpunon, kiun ili faras el tre fortika kaj malmola ligno, antaŭe hardita per fajro. Fik-sita al la harpunfino estas ĉirkaŭ 50

jardoj da ŝnuro farita el la ŝelo de la indiĝena kotonarbo.

La manato estas valora pro sia oleo, kiu enhavas ĉiujn bonkvalitojn de moruooleo, krom aliaj propraj bonkvalitoj. El la blanka viando oni faras ŝinkon, kiu estas tre bongusta kaj nutra, kaj laŭ spertaj opinioj estas bona nutraĵo por ftizuloj.

Kun amikaj salutoj, via fidele, P. H.

PROPAGANDA.

Nia fervora propagandistino s-ino J. L. King kantis Esperantan kanton ĉe koncerto okazinta 15 aŭgusto ĉe Auckland, kaj ankaŭ aperigis bonan propagandan artikolon en la Auckland Star. Gratulojn (Red.)

JURNALOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 1; Amerikana Esperantisto, 3; Amikeco, 7-8; Fulgara Esperantisto, 9; Bulteno Antverpena, 7; Die Einhielsfront, 24, 25; Esperanto, 311; Heroldo de Esperanto, 37, 38, 39, 40; Holanda Esperanto Pioniro, 9, 10; Internacia Esperantoserĝo, 5-6; International Language, julio; Internacia Medicina Revuo, 4; Koletanto, 1, 2; La unuigita Tuthornaro, julio; La Nova Tago, 9; La Suno Hispana, 109-110; Le Monde Esperantiste, 3; Litova Stelo, 7-8; Libera Laboristo, 5-6; La Revuo Orienta, 7; La Progreso, 5-6; Novaj Tempoj, 5-6, 7; Oomoto, 18; Oomoto Internacia, 6; Portugal-Esperanto, 5; Revista del Ateneo, 23; Svenska Esperantisto, 6.

SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS

HOBART — EASTER, 1927.

Venu al Tasmanio, la Ĝardena Ŝtato, por via libertempo.
Belegaj vidaĵoj! Reviviganta klimato!
Esperantistoj speciale bonvenotaj.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

LETERO DE VOJAGANTO.

S-ro Hyde sendis tiun ĉi leteron el Brunei, Borneo, al Melburna amiko.

—Mallonga saluto el sovaĝa lando . . . jes, hodiaŭ Malajo persekutis mian kunulon kaj mi kun "Kris" (venenita ponardo) . . . por eventuale vendi ĝin al mi.

Unu el la komedioj de Ezoko enhavis frazon pri iu internacia kongreso: "Unu karavano perdiĝis sur la maro." Mi ofte pripensis la frazon en lasta tempo. Nia karavano do konsistis el tri: S-ro Laiho, juna ĉino, kiu lernis la lingvon ĉe nia grupo antaŭ kelke da jaroj, kaj mi. Komence ni ekiris tro malfrue, per nia Novega ŝargoŝipo "Tugela." Due la ŝipo frapis rifon kaj tie restis kvar kaj duonon tagojn; oni transportis la ŝargon sur la postaĵo de la ŝipo, fordonis iom al Holanda ŝipo kiu sensukese provis fortiri nin, forĵetis iom en la maro, kaj fine kun helpo de alta tajdo liberigis nin. Ni tiam bruligis parton de la ŝargo (kopro) kaj sukcesis atingi Labuan-on, kie la ŝipo nun atendas karbon. Kun la juna ĉino ni faris dutagan ekskurson al ĉi tiu indiĝena ŝtato per malgranda vaporŝipo. Labuan kaj Brunei mal multe diferencas; nur Labuan, pro fermo de karbminoj estas videble mortanta urbo. Ambaŭ havas kelkmiloj da ĉinaj komercistoj kaj butikistoj, ĉiukekon da Eŭropanoj, miloj da indiĝenoj (kupro koloraj Malajoj) kaj iomete da aliaj.

Labuan havas kelke da judoj mi-grintaj tien el Bagdad post la milito kaj notinda pro . . . malaltaj prezoj! Mankas hoteloj; kaj en Brunei la ŝtata loĝejo por vizitantoj estis okupita de sinjoro. La "Residento" do difinis por ni sian propran tre komforta motorŝipeto kiel loĝejon. Sur la ferkedo mi sidas en trankvila vespero; kantoj pasas kaj repasas; indiĝenoj kantas per streĉitaj voĉoj; kelkaj lampoj lumas en la vasta superakva indiĝena vilaĝo . . . kvazaŭ

ligna Venezio griza kun eluzita aspekto. Luno lumas malgraŭ nuboj, kaj ĉio rebrilas en la malpura akvo.

—Maurice Hyde.

ESPERANTO & THE CONGRESS OF YOUTH.

The third Congress of International League of Youth (Ligue Internationale de la Jeunesse), held in Geneva from 1—5th April 1926 and attended by representatives of Denmark, France, Germany and Sweden, unanimously adopted the following resolution:

Whereas international relations and mutual comprehension between peoples are seriously hampered by diversity of language;

And whereas Esperanto, which is already disseminated, taught and practically employed in many countries, answers this need;

The International League of Youth invites its national sections to promote the dissemination and teaching of the international language Esperanto in their respective countries, and recommends its members to learn this language.

—I.E.S.

THE UNIVERSITY OF ZAGREB & ESPERANTO.

The Yugoslav ex-minister Mr. Radic, has several times expressed himself in favour of Esperanto. Thanks to his intervention, the commercial faculty of the University of Zagreb has decided to introduce Esperanto into its teaching programme. Commencing with the next half-yearly term Esperanto will be included in the curriculum, six hours a week being devoted to it.

—I.E.S.

ĈIU KATOLIKO

ĈIU KATOLIKO

ĈIU INTERESATO PRI KATOLIKISMO

nepre abonu la monatan revuon ilustritan

ESPERO KATOLIKA

16-paĝa — 27 x 18,5.

Jara abonprezo: 4 ŝilingoj.

55 RUE DE VAUGIRARD, PARIS (VI).

THE 8th INTERNATIONAL LABOUR CONFERENCE AND ESPERANTO.

It is a matter of common knowledge that the International Labour Office has for several years past, used Esperanto in its correspondence and in its news service. On the occasion of the 8th International Labour Conference, which recently concluded its sittings in Geneva, the workers' group of delegates unanimously adopted the following resolution:

"The Workers' Group of the Eighth Session of the International Labour Conference, having, during the Session, experienced the difficulties due to the difference of language among themselves and the impossibility of overcoming them even by the use of three national languages,

Declares that the language problem constitute a serious obstacle to ready and complete understanding and co-operation between workers of different countries.

The Group accordingly suggests to the national and international workers' organisations, as well as to the individual members, consideration of the possibility of adopting, as a solution of the problem, the neutral international auxiliary language Esperanto."

This resolution, which was proposed by Mr. R. I. P. Morthised, of the Irish workers' delegation, was supported by Mr. Mertens, the Belgian workers' delegate and president of the group, who stated that he would submit the resolution to the Council of the International Federation of Trade Unions, of which he is president. It was also supported by Mr. Jaszai (Hungary) and Mr. Pugh (Great Britain) who stated that the Trade Union Congresses in their respective countries had already adopted Esperanto. Mr. Curran, delegate of South Africa announced that immediately on his return he would attend the Esperanto classes organised by the Trade Unions. Mr. Serrarens, secretary of the International Federation of Christian Trade Unions, also supported the resolution.

It is worthy of mention that among the government delegations Commander Saralegui (Spain) and Mr. Sakurai (Japan) also speak Esperanto. — I.E.S.

ESPERANTO IN INTERNATIONAL ADVERTISING.

The committee of the international exhibition of river navigation and the use of hydraulic energy, which will be held in Basle from 31st August to 12th September 1926, simultaneously with the World Conference on Energy, has published an attractive prospectus in Esperanto for the purpose of advertising this exhibition throughout the world.

—I.E.S.

AN INTERESTING DISCOVERY.

Esperanto First With the News.

We are informed by a correspondent, who obtained his information by means of Esperanto, that an extraordinary discovery has just been made in Central Asia by Professor A. Fersmann. This scientist has found in the desert of Kara'koum a deposit of several thousand tons of free (uncombined) sulphuric acid absorbed in amorphous silica. Those who have memories of the very reactive nature of sulphuric acid and of its promptness in combining with other substances will be able to appreciate that this unprecedented discovery is certain to give rise to much comment in the scientific world. We believe that we are hereby giving the first announcement in Britain of a result of Professor Fersmann's most recent geophysical investigations.

—International Language.

INTERNATIONAL ORGANISATIONS AND ESPERANTO.

The Universal Union for the Protection of the Blind, at its meeting on 9th April, adopted Esperanto as a medium of international communication. Esperanto is already widely diffused among the blind in various countries, who publish a review in Esperanto, printed in Braille.

—I.E.S.

TOURING AND ESPERANTO.

On the occasion of the International Congress of Geology and the National Esperantist Congress of Spain, held in Madrid at the beginning of June, the Royal delegate for touring of the Spanish government issued an artistically arranged guide book of the history and beauties of Spain, printed entirely in Esperanto.

—I.E.S.

PRI LANDNOMOJ.

De l' Prezidanto de l' Akademio ni ricevis tre klaran noton pri la Landnomoj laŭ Zamenhofa sistemo. Tiun ĉi noton ni resumas ĉi sube:

Malnova Mondo.

La gento donas sian nomon al sia lando per aldono de l' sufikso ujo, laŭ jena modelo:

Franco (gento), Franca (adjektivo), Francujo (lando).

Listo de Ŝtatoj.

Anglujo, Aŭstrujo, Bavarujo, Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Egiptujo, Estonujo, Fin(n)ujo (Fin(n)lando), Francujo, Germanujo, Grekujo, Hindujo, Hispanujo, Holandujo, Hungarujo, Ĥinujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavujo, Katalanujo, Latvujo, Litovujo, Norvegujo, Persujo, Polujo, Portugalujo, Frusujo, Rumanujo, Rusujo, Saksujo, Skotujo (Skotlando), Svedujo, Svisujo, Turkujo, k.t.p.

Nova Mondo.

Ĉar politike malaperis la primitivaj gentoj, la lando mem donas sian nomon al la regnano per aldono de l' sufikso -ano, laŭ jena modelo:

Usono (lando), Usona (adjektivo), Usonano (regnano).

Listo de Ŝtatoj.

Alĝerio, Argentino, Aŭstralio, Bolivio, Brazil(i)o, Ĉil(i)o, Kanado, Kaptlando, Kolombio, Maroko, Meksikio, Nov-Zelando, Peruo, Tunizio, Urugvajo, Usono, Venezuelo, k.t.p.

Nomoj de Provincoj kaj Urboj.

Aldoni la finaĵon -o al la provinca nomo: Brandenburg, Silezio, Provenco — se ne eble, senŝanĝe: Loiret, Essex.

Kelkaj nomoj de gravaj ĉefurboj esperantigis: Parizo, Genevo, Kopenhago. — Aliaj simple alprenas la finaĵon -o: Londono, Berlino — se ne eble, senŝanĝe: Versailles, Breslau.

Prof. Cart aldonas, ke en tiu ĉi landnoma demando kiel en aliaj, plej bona gvidanto restas por ni D-ro Zamenhof.

OFFICIAL EXAMINATIONS IN ESPERANTO.

An official decree of the Ministry of Public Instruction of Austria dated 30 April 1925 (Z 2163) established an official examining commission for Esperanto. The commission commenced its labours last November. Thirty-one candidates took part in the examination first and all obtained the diploma of capacity. The next examination will take place at Easter in Vienna.

In Germany an Esperanto Institute for the German Republic has existed since 1922 at Leipzig under the patronage of the Ministry of the Interior (Education Department), with examining commissions in almost all the large towns of Germany. In Czechoslovakia and Brazil there are also official examinations in Esperanto established by the State.

—I.E.S.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaudon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobaria Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books.

FREE TO YOU.